# AMO rifuzas velki



AMO reviviĝis post unutaga paŭzo; en la unua duono de la mateno de ĵaŭdo (la 28an de aŭgusto) de la AMO-seminario en Italio rolis rol-ludo. Nome, la dudeko da partoprenintoj estis mirakle transportitaj al nova kontinento, Azanio, kiu leviĝis el la maro post la kataklismaj eventoj de 2016 – tertremoj, tsunamoj, tajfunoj kaj temperaturŝanĝoj. Tie ili setlis en kvin landoj, fondis E-klubojn aŭ fakajn rondojn. Nun la tasko: helpe de mapo de la nova kontinento, oni devis prepari sin ĉiulande por kunsido, kies celo estas starigi tutkontinentan (fakte tutmondan) asocion: UPEA (Universala Postkataklisma Esperanto-Asocio). Pruviĝis malfacile decidi kie troviĝu la sidejo kaj oficejo por UPEA, des pli elekti ties prezidanton. Postaj taskoj estis krei 5-jaran laborplanon (40 vortoj kun nur kvar punktoj), krei buĝeton, krei politikon de eksteraj rilatoj kaj organizi la unuan kontinentan kongreson. Fine, okazis mallonga pritaksa diskuto pri la sentoj dum la plenumo kaj taksado, kiom utilas la rolluda ekzerco.

Post la paŭzo venis trideko da seminarianoj por ĝui la prelegon de Giulio Cappa, profesia televida ĵurnalisto. Li prezentis serion da praktikaj konsiloj, kiel prezenti gazetaran komunikon, por ke ĝi havu bonajn ŝancojn travivi kaj aperi. Lia premiso estis, ke ĵurnalistoj fariĝas ĉiam pli pigraj, kaj se vi helpas ilin maksimume, viaj verkaĵoj pli verŝajne aperos. Lia plena prezentaĵo fariĝos alirebla, memorinda estas la simpla kontakto, ke la bezonaĵo estas novaĵo.

**Novaĵo:** io impresa, io surpriza, io proksima.

Pretigu jam atentokaptan titolon (maks. 5 vortojn). La unua frazo (25 vortoj) resumu la kernon de la tuta teksto, kaj entenu ion rimarkindan. La plena komuniko neniam apleksu pli ol unu paĝo. Ĉe ĉiu raportaĵo, kiom ajn rutina, eblas fosi kaj trovi ion impresan, surprizan; tio formu la enirpunkton. Proksimaj novaĵoj interesas lokulojn; eĉ se via raportaĵo estas, ekzemple, pri Universala Kongreso en alia kontinento, trovu iun ligon kun lokulo, kun loka grupo aŭ loka projekto.

Plie, li montris tri tre interesajn televid-novaĵajn raportojn, do ĉiuj mallongaj; unu itallingva, unu hispanlingva farita en la ĵusa universala kongreso, kaj unu farita en la antaŭa itala kongreso, kiu enhavis ankaŭ intervjuon kun Probal Daŝgupta, la tiama prezidanto de UEA. Kaj la demandoj kaj respondoj estis en Esperanto, kun subtitoloj en la itala. Sekve ne necesis klarigi, ke ĝi estas efektive parolata, uzebla lingvo, la intervjuo en si mem komunikis tiun mesaĝon.

Dua parto de la prezentaĵo temis pri la historio de la movadaj debatoj pri niaj celoj por la lingvo kaj por niaj klopodoj disvastigi ĝin. Eniris la bildon diroj de Zamenhof (1910), pensoj de Lanti

(1931), la Principaro de Frostavallen (1956), la Deklaracio de Tyresö (1972), Manifestoj de Raŭmo (1980) kaj de Prago (1996), elpaŝoj de civitismo, reagoj de William Auld, Georgo Kamaĉo k.a., kun multaj pliaj fontoj arigitaj sed ne uzitaj. Rimarkinda superrigardo, kiu servu por memorigi al la nunaj geAMantoj, ke ili pioniras malpli ol oni supozas; la nune traktataj temoj, tamen estas primaĉataj jam tra tridek, kvardek, eĉ cent jaroj. Sed ne venis definitivaj respondoj, do ili restas ĉiam aktualaj kaj retraktendaj ĉe novaj generacioj.



Jen la celo de AMO ĉe UEA.

Foto: Du diskutrondoj.
Ĉiuj fotoj de Giulio Cappa.

En la konkluda vendreda sesio de la Seminario pri Aktivula Maturigo en la Itala Kongreso, venis bona propono; ke ni pretigu konkretajn konsilojn por E-grupoj kaj E-asocioj pli lokaj ol la Landaj Asocioj. Post multa diskuto, jen la rezulto:

**Konsiloj por Lokaj kaj Regionaj Grupiĝoj**

- Pretigu trejnkursojn por efika informado.
- Engaĝu fakulojn pri informado – eĉ ne-esperantistojn.
- Organizu eventojn malfermaj al publiko.
- Trovu interesojn, volojn de alparolatoj – adaptu la aliron al la trovaĵoj.
- Kontaktu NROjn kaj proponu prelegojn prilingvajn.
- Eluzu publikajn eventojn: urbajn festojn, librofoirojn…
- Aliru prudente lokajn politikistojn kaj konatajn homojn.

Poste ni aldonos pli kompletan version de la konsiloj, kiuj difinos terminojn kaj aldonos iomete da detaloj. Pli kompletaj informoj pri la vendreda programo devos sekvi.



PDF farita SMG Aug 29, 2014,
per Nuance PDF Create 8.